

Ludwig Heinrich Christoph
Hölty,

Printempa lido

tradukita de Richard Schulz

Aero blua, verda val'!
Invitas nin herbej-regal'.
Floretoj Majaj floras.
Primola bunt'
Natura punt'
La grundon pli dekoras.

Nun venu la amant' de l' Maj',
Ekĝoju pri la mondo kaj
La Dia patra amo;
Estigis ĝi
Kun harmoni'
La arbon en ornamo.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingslied" de LUDWIG HEINRICH CHRISTOPH HÖLTY (Holtjo, Ludoviko Henriko Kristofo, *1748-12-21 – †1776-09.01) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984-07.*

Arg-508-998 (2013-02-26
15:15:37)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi tradukon en la "Vestfaliaj Flugfolioj", n-ro 61, kiujn eldonis siatempe s-ro Richard Schulz (Rikardo Ŝulco). Pri Richard Schulz troviĝas informoj en http://eo.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Ludwig Heinrich Christoph
Hölty,

Printempa lido

*tradukita de Manfredo
Ratislavo*

Ĉielo bluas super mi;
En tiu verda valo ĉi
Floretoj buntas ĉie,
Sur la herbej'
En ĉiu ej',
Floradas idilie.

Pro tio venu tien ĉi,
Kaj ĝoju pri la mondo vi
Kaj pri l' bonec' de Dio,
Per kies fort'²
Kaj kies vort'
Fariĝis ja ĉi ĉio.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingslied" de LUDWIG HEINRICH CHRISTOPH HÖLTY (Holtjo, Ludoviko Henriko Kristofo, *1748-12-21 – †1776-09.01) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-02-28.*

MR-72-1 / Arg-508-997
(2014-05-01 09:00:10)

Ludwig Heinrich Christoph
Hölty,

Frühlingslied

Die Luft ist blau, das Tal ist grün,
Die kleinen Maienglocken blühen
Und Schlüsselblumen drunter;
Der Wiesengrund
Ist schon so bunt
Und malt sich täglich bunter.

Drum komme, wem der Mai gefällt,
Und freue sich der schönen Welt
Und Gottes Vätergüte,
Die diese Pracht
Hervorgebracht,
Den Baum und seine Blüte.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas LUDWIG HEINRICH CHRISTOPH HÖLTY (Holtjo, Ludoviko Henriko Kristofo, *1748-12-21 – †1776-09.01).*

Arg-508-996 (2014-05-01 10:13:25)

Siehe auch http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Christoph_Heinrich_H%C3%B6lty, http://gedichte.xbib.de/H%F6lty_gedicht_Fr%FChlingslied.htm und http://www.literatur-niedersachsen.e/Detailansicht.24.0.html?&cHash=b8f77332c&tx_literaturportalnds_pi1%5BshowUId%5D=237. La melodio aŭdeblas en <http://www.volksliederarchiv.de/text2820.html>. Pri la poeto vidu ankaŭ la retejon <http://www.goethezeitportal.de/>.

²aŭ:

Kaj pri l' boneco Dia.
Per Lia fort'
Kaj Lia vort'
Ekestis belo ĉia.